



Ateismo

Bulteno de Ateista Tutmonda
Esperanto-Organizo

<http://ateisto.org>



Vorto de la redaktoro

Mi ne bedaŭru ke venis sufiĉe granda kvanto da artikoloj ĉifoje, sed mia enkonduko tial estu escepte mallonga. Nu, du trionoj de ĉi tiu numero estas okupataj de la tre interesa ese (Esperanto kaj Ateismo) de D.Blanke.

De la lasta numero okazis UK en Lille, kaj ĉi-kongrese niaj agadoj estis aparte sukcesaj, laŭ diversaj kriterioj : deko da novaj membroj, salon-plena partopreno al la debato pri "Ateismo kaj la rajto je libera esprimiĝo". Pluraj laŭvoĉe legis siajn kontribuojn al la debato. Kelkajn mi kolektis kaj publikigas.

Rilate al la pluraj proponoj pri nova simbolo de ATEO, voĉdonado inter la ĉeestantoj montris, ke ĉiuj proponoj havas siajn subtenantojn, ankaŭ la propono, ke ATEO entute ne havu ŝildon. Tamen, malgranda plejmulto opiniis, ke ni retenu nian ekzistantan simbolon, nur forigante la literon A (kiu origine signifis "Ameriko" kaj ne "Ateismo"). Dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis proponojn pri nova simbolo !

"Helpu ! Nia revuo estas en danĝero !"

Aliteme, jam antaŭ pli ol unu jaro, mi unuafoje atentigis ke mi ĉesigos mian redaktorecon fine de 2015. Ni esperis ke la UK estos oportuna momento por trovi anstataŭanton. Ve ! Ĝis nun neniu respondis pozitive.

Tre bonvena estos ies sinpropono. Ni antaŭdankas.

Christian Rivière (Francujo)

Ateismo kaj la rajto je libera esprimiĝo

(kongresa temo)

Unua parto :

Kiam mi legis la temon en la bulteno "Ateismo", mi unue penis kompreni la temon kaj tial, serĉis la signifojn de la vortoj.

Unue, **ateismo** :

Laŭ PIV, ateismo estas doktrino kiu neas la ekziston de dioj aŭ Dio. Kaj doktrino estas aro de la principoj kaj sistemaj teorioj kiujn **instruas** iu religio, filozofio, scienco, politika partio.

Laŭ vikipedio : Ateismo estas grekdevena vorto kiu signifas sendiismon aŭ di-neismon.

Tamen, **laŭ PIV** : -ismo estas : sufikso montranta sistemon kiu **trudas** al personoj sub ĝia influo difinitan konduton ; ĝi sekve aplikiĝas al : doktrino, movado aŭ sistemo de iu persono kaj de ties sekvantoj ; doktrino aŭ sistemo rilata al iu temo.

Trudi : devigi iun kontraŭ lia/ŝia volo al io malagraba, devige akceptigi ion al iu.

Resume : Jam la temo pripensigis min. Por multaj homoj la ismoj estas trudaj doktrinoj.

Do, parenteze, mi titolus nian bultenon : "Sendia", "la Sendiulo", aŭ "Sendiulo". (Espereble, tiu nomo ne estas jam uzata de alia organo). "Sendiulo" montras "staton" sen ideo de trudo.

Dua parto :

Ĉu ni volas trudi la sendiecon aŭ ĉu ni nur volas prireklami, montri, konigi nian senkredecon ? Mia opinio estas ke ni ne devas trudi nian senkredecon sed prireklami, konigi ĝin, dirante, ekzemple, tutsimple : **mi estas sendia.** (en franca lingvo : **je suis un mécréant**)

La diskuto povus esti tia : – mi estas sendia – kial ? – la sciencaj scioj nun pruvas la erarecon de la Libro (Biblio, Evangelio, Korano, Torao ktp...). – donu ekzemplojn ! – La kreĝo de Tero

kaj de la universo laŭ la Libroj estas erara. – vi ne respektas la religiojn! – vi, respektu la individuan liberecon. Mi rajtas esprimiĝi kiel mi volas.

Ĉu oni ankaŭ rajtas diri: *la dioj, samkiel Avofrostoj, ne ekzistas.* Tio estas mokado, sed trudi la ekziston de dio aŭ dioj estas kontraŭlibere, kaj trudi preceptojn laŭ la laŭdire Sanktaj Libroj estas ankoraŭ pli kontraŭlibere.

Kompreneble, por diri mokadon, la esprimiĝo devas esti plene libera. La libera esprimiĝo estas parto de la individua **libereco** kaj la **libereco** estas valoro kiun oni aprobas aŭ ne. Mi memorigas al vi kio estas la libereco:

"La libereco estas la stato de homo aŭ popolo, kiu ne suferas de devigoj, de submetoj aŭ de servodevoj farataj de alia homo, de tirana potenco aŭ alia potenco, kaj ankaŭ la libereco estas la stato de homo aŭ popolo kiu uzas tiun rajton ne malhelpante la liberecon de la aliaj."

Kiam oni submetiĝas al iu religio kaj al ties institucioj, tio nomiĝas "submetiĝo" / "soumission" en la franca lingvo.

Tria parto :

La esprimiĝo devas esti libera kaj ankaŭ la libereco devus esti konstitucia kaj leĝa valoro.

Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.
Artikolo 19. *Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimado ; ĉi tiu rajto inkluzivas la liberecon havi opiniojn sen intervenoj de aliaj, kaj la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj senkonsidere pri la landlimoj.*

La demando devus esti : Kiu lando, kiu registaro aprobas la valoron "Libereco". Instinkte, mi dirus "neniu". Necesus, certe, listi ĉiujn landajn aŭ regionajn konstituciojn. Necesus listi ĉiujn leĝojn kiuj ofte kontraŭdiras la konstituciojn, necesus listi ĉiujn sociajn kaj religiajn ordonojn kiuj estas cititaj en la laŭdire Sanktaj Libroj.

Do, necesus legi la Librojn pri hinduismo, budhismo, judismo, kristanismo, islamo ktp... Ankaŭ necesus listi la realajn eventojn kiuj okazas en la diversaj landoj. Vasta laboro ! Ankaŭ necesus analizi la laŭdire demokratiojn.

Parenteze : la politikistoj elstarigas ofte la demokration. Tamen, oni sciis ke la demokratio estas nur la povo de la plimulto de la homoj de iu lando kiuj balotas aŭ voĉdonas. Ofte la rezulto de iu baloto malpermesas la individuan liberecon. Oni devas mediti pri tio kaj ne konfuzi la du ideojn "libereco" kaj "demokratio". Koncerne la religiojn, devas esti du kondiĉoj. La lando devas esti laika, t.e. la disigo inter la ŝtato kaj la eklezio devas esti plena. Ne nur la institucioj sed ankaŭ la preĝejoj devas esti venditaj, la preteksto de la kulturo por restaŭri la preĝejojn per la impostoj estas friponaĵo. La restaŭrado devas esti pagita de la religianoj kaj de tiuj kiuj opinias ke la preĝejoj estas kulturaĵo. Tio nomiĝas "libereco" kaj "respondeco". Ankaŭ la **laikeco** ne estas sufiĉa. **La privataj aferoj** ne devas iri trans la limon de la individua libereco.

Kvara parto.

Ĉu oni rajtas kontraŭdiri la religiojn, moki la religiojn ? Se oni havas la rajton je libera esprimiĝo, oni rajtas moki kaj tial oni devus havi la rajton moki la religiojn. Tamen en multaj landoj oni ne rajtas moki aŭ tutsimple diri sian opinion, kaj reale eĉ en la oficialaj liberaj landoj malgraŭ bonaj leĝoj, oni ne rajtas esprimiĝi libere pro sociaj kutimoj. En Francujo, oni rajtas moki la religiojn sed la lukto por konservi tiun rajton estas senfina. Necesus diri ankaŭ ke la kugloj ne agnoskas la leĝojn kaj siblas kelkfoje danĝere. Mi pensas (sed mi povas erari) ke moki la religiojn ne helpas al la plimultiĝo de la sendiuloj kaj al la pligrandiĝo de la libereco. Pli efike estus proklami ke ni estas sendiaj kaj kuraĝigi la homojn membriĝi grandkvante al nia asocio. **Granda kvanto da sendiuloj bone listitaj en nia asocio nin fortigos.**

Ahado Michel (Francujo)

Dum la pasintaj jaroj mi rimarkis, ke ankaŭ en la esperanto-komunumo ekestis riproĉo pri rasismo, kiam temas pri religikritiko. Tio okazis pri la ilustrita religikritika infanlibro „*Kie ni povas trovi Dion ? demandis la eta porkido*“ de Michael Schmidt-Salomon kaj Helge Nyncke.

Rasismo estas klare difinita nocio, ekzemple laŭ la franca leĝaro : temas pri diskriminacio kontraŭ personoj pro origino, sekso, fizika aspekto, handikapo, seksa orientiĝo, aparteno al etna aŭ religia grupo.

Do, tute klare primoko kaj ŝerco pri religiaj kutimoj ne devas esti konsiderata kiel diskriminacio, sed kiel libero de opinio. Ili malegalas al instigo al malamo de homgrupo aŭ al kalumnio de homgrupo pro religio. Mi absolute konsentas kun Stéphane Charbonnier, ĉefredaktoro de la franca semajna gazeto *Charlie Hebdo*, kiun pasintjanuare murdis religiaj fanatikuloj. Li dediĉis tutan libreton al la kritiko de la nocio islamofobio, tute maltaŭga nocio.

Laŭ li, simple ne eblas insulti religion. Male, laŭ li estas maljuste aserti, ke religianoj nepre ne komprenas humuraĵojn. Krome, li ne trovas bona la klasigadon de civitanoj laŭ religioj. La nocio de blasfemo laŭ li, ĉefe helpas la subpremadon de esprimlibero.

PEN-klubo internacia, do la asocio de poetoj, eseistoj kaj romanverkistoj konsentis kun tiu opinio kaj ĉi-jare transdonis la premion pro agado por esprimlibero, al la redaktoro de *Charlie Hebdo* postvivinta la atencon en januaro. Protestis kontraŭ tio kelkaj anglalingvaj aŭtoroj, kiuj sen kono de la franca, akuzis la franclingvan gazeton pri rasismo. Forte subtenis tiun premiadon aliflanke Salman Rushdie, mem de jardekoj en vivdanĝero pro dekreto de la irana ŝtato.

Mia celo ĉi tie ne estas detaligi tiujn publikajn diskutojn ĉirkaŭ la konata gazeto, sed alvoki franclingvajn ATEO-anojn esperantigi la supre jam menciitan libreton de Stéphane Charbonnier „Lettre aux escrocs de l'islamophobie qui font le jeu des racistes“ kaj krome atente legi *Charlie Hebdo*-n ĉefe priatentante artikolojn, kiuj pritraktas religikritikajn temojn kaj traduki aŭ resumi ilin, por ke la internacia legantaro de ATEO povu profiti de ili.

Mi finas resumante raporteton de Zineb de la 8^a de julio 2015, ĉar ĝi estas esperiga : En Islando la

indigno pro la atencoj kontraŭ la Charlie-Hebdo-anoj estigis ŝanĝon de leĝo : Oni tie abolis – post peto de la pirata partio – la kontraŭblasfemajn leĝojn, kiuj ekzistis ekde 1940. Protestis kontraŭ tio la katolika eklezio, sed episkopo de la luterana eklezio (80% de la islandanoj) bonvenigis tiun ŝanĝon dirante ke la eklezio devas konsenti kun la modernaj valoroj kaj respekti la esprimliberon !

Maria Merla (Germanujo)

La uzado de libereco por esprimi la propran penson dependas de la kono de alies penso. « Tot capita, tot sententia » (« Kiom da homoj, tiom da opinioj ») memorigas la anktivuloj. Por ne ofendi niajn similulojn, oni bezonas koni iliajn intiman sentemon, kulturon, morojn, religion kaj fine la tutan historion de la apartena popolo.

Ekstrema fido pri la propra kredo ne povas rajtigi malŝaton de alies kredo. Aliflanke simpla regulo de sana prudento kaj bonedukiteco postulas malpermeson trudi insultajn epitetojn al iu ajn, ankaŭ se pravigitan per realaj datenoj, kiel konsideri iun kontraŭvole nekleran homon nekompetentulo ; elstrarigi difektojn malbonŝance havitajn ktp.

Koncerne nuntempan problemon pri pliakrigo de la religia batalo precipe fare de islamo, estas nepre kondamninda interŝanĝo de moko, priridoj, vinjetoj celitaj por profunde vundi la animon de la adresitoj, je la nomo de religia libereco, de nepra absoluta liberpenso, kiu fakte ne ekzistas kaj ne povas realiĝi iel ajn, se oni volas eviti reagojn abnormajn kaj ne inversigeblajn, kun damaĝoj nereteneblaj por la tuta homa komunumo.

Prudento lumigita de saĝo devas regi ĉian nian agon, senkonsidere al posedo de la vero, valoro pure subjektiva kaj necerta, submetita kiel ĉiaj aĵoj al historia evoluo de la universa vivo. Ĉirilate mi opinias utile substreki la bonefikan influon de la budhana penso pri toleremo, respekto al aliuloj ĉar ni ĉiuj estas parto de la universa esenco en kiu ni vivas, suferas kaj rajtas ankaŭ ĝui proporcie al nia akirita grado de reciproka kompreno. Unuigite en la lukto por

solvi la neeviteblajn problemojn de kunvivado, ni povas strebi kaj esperi pri la atingo de internaj paco kaj sereneco, kiuj nuraj firmigas veran kaj sanan progreson al la tuta vivo sur Tero, ĉi tiu malgranda floso, portanto de konscienco pri senlima universo, kies esplorado okupos la homan aktivecon dum la venontaj jarmiloj.

Pino Lalli (Italujo)

Sincere, mi ne facile komprenis la rilaton inter la titolo de nia hodiaŭa debato kaj la ĉi-jara okazaĵo ĉe *Charlie Hebdo*. Tion mi ekperceptis antaŭ-ne-longe. Pro pluraj kialoj :

- . nur unu el la du viktimaĵoj estas sidejo de gazeto ;

- . nur kvin el la dek ok viktimoj estas desegnistoj (kaj ne ĉiuj estis karikaturistoj pri religiaĵoj !)

- . mi supozas ke nur malgranda parto de la paĝaro de *Charlie Hebdo* estas dediĉita al mokado de religioj (tion konfirmis Janine Dumoulins kiel regula leganto de tiu gazeto) ;

- . inter la viktimoj troviĝis kaj nekredantoj kaj kredantoj, inter kiuj katolikoj, judoj kaj ... islamanoj (ekz. la celkonscie mortpafita policisto).

Mi sincere opinias ke la plejmulto kaj de la kredantoj kaj de la nekredantoj estas sufiĉe inteligentaj por kompreni ke tiu okazaĵo estas nenio krom murdo.

Ĉar la amaskomunikiloj gurde elvokis la problemon de la karikaturoj (tiel responsigante la viktimojn mem !), mi volonte aldonus kelkajn vortojn :

Unue, estas evidente ke la tiel nomata « delikto de blafemo » ne ekzistas, pro la simpla kialo ke en respubliko (des malpli en laika respubliko), ĝi ne havas signifon, eventuale nur religian signifon, kion ne eblas enkalkuli. Ni ne povas diri « Oni rajtas blafemi » nek « Oni ne rajtas blafemi » ĉar neniu jura decido povus serioze uzi tiun terminon.

Due, ni ĉiuj, kiel homoj, devas respekti la aliajn homojn. Tio estas absoluta devo. Sed tio

tute ne signifas ke respekto de kredoj estas devigata (cetere en Francujo la plej granda parto de la kredantaro tion komprenas, akceptas kaj eĉ aprobas). Eble restas problemeta situacio kiam oni mokas reprezentanton de iu religio. Nu, estas klare, ke ne la homon mem oni mokas sed la religion tra ties reprezentanto, kiu cetere memvole ne kaŝas siajn konvinkojn.

Trie, estas nekredeble ke oni reparolas pri tio ĝuste en epoko kiam tiu tradicio (karikaturo desegno) neniam delonge en nia historio estis tiom malakra, tiom malmulte impertinenta, tiom mem-cenzurita (ankaŭ tion prave reliefigis Janine Dumoulins dum nia kongresa kunveno). Cetere, ni ne forgesu ke ĉirkaŭ la desegnoj normale abundas artikoloj, kaj nur post ilia legado eblas decidi pri la vera intenco de la tuto.

Kvare, estas evidente ke ĉirkaŭ mi, multaj anoj de la katolika religio ja havas sufiĉe da humuro por ne ofendiĝi pro simpla moko de propra religio. Certe multaj el ili troviĝas inter la abonantoj de la satira ĵurnalo. Aliektreme, mi ateisto devas rekoni ke mi neniam legis eĉan linion de *Charlie Hebdo* (eĉ se mi konas plurajn el la mortintaj desegnistoj ĉar ili ofte kontribuis en aliaj naciaj ĵurnaloj). Verdire, mi rekonas ke mi ne tro ŝatas. Eble humuro mankas al mi.

Konklude, « delikto de blafemo » ne ekzistas kaj ne povas ekzisti en Francujo. Pri tio ni ne cedu, almenaŭ ĉar multaj landoj tra la mondo ne havas tiun bonŝancon, kaj supozeble envas nin.

Pripenso ekster la kongresa debato :

Debati pri temo rilatanta al iuj "Limoj de la libereco" ĝenis min. Verŝajne ĝi same ĝenis aliajn francojn inter la ĉeestantoj, eble eĉ kelkajn ofendis. Kiu libereco ? Ĉu la libereco pafi ? Ĉu la libereco preĝi ? Ĉu la libereco pensi ? Ne utilas debato. Pafi, ne. Preĝi kaj pensi evidente jes. Fina punkto, ĉar la respondoj estas konataj de pli ol unu jarcento.

Tiun ĉi temon oni gurde submetas en niaj amasmedioj, tiel sugestante ke povus esti limoj ne ankoraŭ difinitaj, ke eble iuj desegnistoj tro libere

desegnus, ke eble ili iel kulpus, ke ili devus minimume sin cenzuri, ke ekzistus "delikto de blasfemo" (!!), ke eble (ha jen la celo de la operacio) la leĝo devus esti modifita, eble por konformiĝi al iu eŭropa integriĝo, ke ni devus adaptiĝi, ke la laikeco estus akcepto de ĉiuj religioj, ke ni devus elspezi publikan monon por helpi la bonajn kredantojn kontraŭ la malbonaj, privatigi la edukadon de niaj infanoj anstataŭ la publika edukado de la respubliko ... Haltu !! Tiu ludo estas tro danĝera. Mi ne fantazias ĉar bedaŭrinde tiu evoluo estas laŭtage konstatabla en mia lando. Kio okazis antaŭ kelkaj monatoj estas nur plia preteksto por rapidigi la procezon. Fine procezo kiu neeviteble alkondukos nin al ... limigo de la libereco por ni ĉiuj.

La laikeco estas kompromisa regulo kiu helpas nin kunvivi, kaj profite al la kredantoj por libere kredi, preĝi kaj tion elmontri, kaj profite al la nekredantoj por libere pensi kaj esprimi sian penson kaj sian rifuzon de obskurismo.

Siaflanke pafistoj estas simple murdistoj. Ili estas nek kredantoj, nek nekredantoj. Tio situas ĉe tute alia nivelo : juro kaj puno.

Christian Rivière (Francujo)

Esperanto kaj Ateismo

Antaŭrimarko

La sekva teksto baziĝas je germanlingva originalo kun la titolo „Esperanto und Atheismus“, kiun ĉe mi mendis la ĉefredaktoro de la germana revuo „humanismus aktuell“ (humanismo aktuale), organo de „Humanistische Akademie Berlin-Brandenburg“ (Humanisma Akademio de [la germanaj federaciaj landoj] Berlino / Brandenburgio)¹.

Sekvante la peton de la redaktoro mi uzis la eblecon informi la legantaron per specifa teksto

pri la vivanteco kaj idea multkoloreco de la esperanta lingvo-komunumo.

Dominique Simeone, vicprezidanto de ATEO, min petis esperantigi la germanan tekston. Al li mi dankas kelkajn sugestojn, korektojn kaj informojn, same al *Ralph Dumain* (Vaŝingtono), kiu estis prezidanto de ATEO de 1987 ĝis 2002.

Ĉar la originalo estis dediĉita al germanaj legantoj, ne multon sciantaj pri Esperanto, mi iom prilaboris la tekston por la esperantlingvaj legantoj. Mi krome iom aktualigis kaj kompletigis ĝin. Tamen la sekva teksto kompreneble ne povos elĉerpi la temon. Mi ĝojus, se aliaj eble pli bone informitaj homoj povus pliprofundigi la temon.

1 Religioj en la esperanta lingvo-komunumo

1.1 La hilelismo / homaranismo de Zamenhof

Kiel konate la iniciatinto de Esperanto, *L.L. Zamenhof* (1859-1917), sekvis du idealojn, kiuj por li formis certan unuecon. Per politike neŭtrala lingvo kaj kvazaŭ kosmopolita religio li esperis fari kontribuon al la unuiĝo kaj interpaciĝo de la homaro, disigita per malamo kaj interetnaj konfliktoj.

Lian kosmopolitan religion li nomis „hilelismo“ laŭ la juda saĝulo Hillel, kiu vivis de proksimume 60 a.n.e.² ĝis proksimume 10 p.n.e. La tekston pri hilelismo Zamenhof publikigis unuan fojon en 1906. Prilaboritan formon de hilelismo li poste nomis „homaranismo“, kiun li publikigis en 1913 (Zamenhof 1929 : 312-343)³. Sian mirinde aktualan interpreton pri tio, kio povus esti „Dio“, Zamenhof formulis jene :

„La plej altan por mi ne kompreneblan Forton, kiu estas la kaŭzo de la kaŭzoj en la mondo materia kaj morala, mi povas nomi per la nomo „Dio“ aŭ per alia nomo, sed mi konscias, ke la esencon de tiu „Forto“ ĉiu havas la rajton prezenti

¹ Vd. <http://www.schattenblick.de/infopool/weltan/human-vd/whber175.html> (ĉiujn retligojn mi laste kontrolis 10.7.2015)

² a.n.e. = antaŭ nia erao, p.n.e. = post nia erao.

³ Ankaŭ vd. la analizon de Kiselman 2010.

al si tiel, kiel diktas al li lia prudento kaj koro aŭ la instruoj de lia eklezio. Neniam mi devas malami aŭ persekuti iun pro tio, ke lia kredo pri Dio estas alia ol mia“ (Zamenhof 1929:342).

Ankaŭ en sia poemo ”Preĝo sub verda standardo” Zamenhof aludis al sia tolerema koncepto pri Dio. Dum la inaŭguro de la unua Universala Kongreso de Esperanto (1905 en Boulogne-sur-Mer) li volis prezenti la kompletan ”preĝon”, sed pro insistado de la malpli religiemaj kaj pli racionalisme orientitaj francaj organizantoj li ne prezentis la lastan strofon. Jen ĝi :

“Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,
Antaŭen kun pacaj armiloj !
Kristanoj, hebreoj aŭ mahomedanoj
Ni ĉiuj de Di’ estas filoj.
Ni ĉiam memoru pri bon’ de l’ homaro,
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro
Al frata la celo ni iru obstine
Antaŭen senfine !

Ignorante, ke *Zamenhof* menciis nur ‘fratojn’ kaj ne ‘fratinojn’ kaj nur ‘filojn’ kaj ne ‘filinojn’, oni povas vidi en tiu strofo ekumenan bazon, tute aktualan kaj dezirindan en la nuna tempo, kie t.n. interreligiaj konfliktoj multas, kvankam en vero ili ĉefe kaŝas la pli profundajn kialojn, kiuj esence havas potencpolitikajn kaj ekonomiajn bazojn.

1.2 Aktualaj religiaj grupiĝoj⁴

La pacifisma-kosmopolita religia filozofio de Zamenhof havis konsiderindan influon en la lingvo-komunumo de Esperanto, kiu efikas ĝis la nuntempo. Eble ĝi kunefikis, ke apud la du grandaj kristanaj religioj aparte du aliaj religioj havas adeptojn inter esperantistoj : La religioj de Baha’-i (Bahao) kaj Omotokyo (Oomoto).

La iranano *Bahá’u’lláh* (1817-1892) en 1863 fondis kosmopolitisme orientitan religion, la bahaismon, kiu nuntempe estas persekutata en Irano (kp. Halve 1999). La bahaismo havas adeptojn tutmonde. Ĝi i.a. pledas por la enkonduko de internacia lingvo kaj vidas en la homaro kaj ties

religioj unuecon.

Bahá’u’lláh interesiĝis pri Esperanto kaj pledis por ĝi. Ekde 1973 ekzistas “Bahaa Esperanto-Ligo” (BEL) kun la organo “La BEL-Monda Letero”.

La japana Omotokyo-religio (kp. Lins 1975 ; Gilkey 1980), estis fondita en 1892 de *Deguchi Nao* (1836-1918) kaj grave influita de *Deguchi Onisaburo* (1871-1948).

La adeptoj de tiu ĉi same kosmopolite orientita religio esperas pri monda paca regno, laŭ la formulo „Unu mondo – Unu Dio – Unu Lingvo“.

Pri ambaŭ religioj de tempo al tempo aperas moderne faritaj materialoj. Tio aparte validas por la „Esperanto-Populariga Asocio“ (EPA) de Oomoto, kiu eldonas revuon kaj ankaŭ okazigas bone vizitatajn kultur-aranĝojn kadre de la universalaj kongresoj.

En Koreio estiĝis alia religio, la Ŭonbulismo, kies esperantlingvaj adeptoj kolektiĝis en la „Esperantista Asocio de Ŭonbulismo“ (EAŬ).

Multe pli grandan influon en la Esperanto-movado havas la kristanaj Esperanto-organizaĵoj (Matthias 2001).

Jam en 1910 estis fondita la „Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista“ (IKU), kiu ekde tiam eldonadas la revuon „Espero Katolika“. Ekde 1977 Radio Vatikano periode disaŭdigas programojn en Esperanto. La esperantistoj evangeliaj (aŭ protestantaj) en 1911 fondis la „Kristanan Esperantistan Ligon Internacian“ (KELI), kies organo estas „Dia Regno“.

Al la variantoj de kristanaj religioj, kiuj aktivadas en la esperanta lingvo-komunumo, ankaŭ apartenas la fondita en 1921 „Kvakera Esperanto-Societo“ (KES) kaj la meze de la 1990^{aj} jaroj en Bulgario fondita „Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista“ (TOLE). Krome menciindas la „Por-Esperanta mormornano“ (PEM).

Ankaŭ alia granda religio finfine estas reprezentita inter esperantistoj, la islamo pere de „Islama Esperanto-Asocio“ (fondita proksimume fine de la 1990^{aj} jaroj).

Pluaj religiaj resp. religi-filozofie orientitaj

⁴ La informoj baziĝas je la eldono de la Jarlibro de UEA por 2014.



organizaĵoj estas la „Budhana Ligo Esperantista“, kaj la „Hilelisma Esperanto-Komunumo“ (HEK, fond. 2001).

Al esoteraj sektoj kalkuleblas la aparte en Brazilo aktiva „Spiritisma Eldona Asocio F.V. Lorenz“ (fond. 1975, organoj, Komunikoj kaj „Almanako Lorenz“). Same la „Martinus-Instituto“, kiu disvastigas la Martinus-kosmologion (fonditan de la dano *Martinus* [1890-1981] kun revuo „Kosmos“). La „Amikaro Bruno Gröning“ estis fondita de *Grete Häusler* en 1979 por disvastigi la instruon de *Bruno Grönkowski* (1906-1959), homo kiu sub la nomo *Bruno Gröning* sin prezentis kaj agis kiel (mirakla) sanigisto.

Preskaŭ ĉiuj el la menciitaj religioj disponas ankaŭ en Esperanto pri siaj ĉefaj verkoj. Tio validas por la Biblio (pluraj tradukoj, vd. Blanke 2014) same kiel por la Korano (du tradukoj).

Kiel *Frank Stocker* montris en sia sociologia analizo pri Germana Esperanto-Asocio ĉ. unu triono (32%) de la enketitoj ne sentas sin ligita al iu religia komunumo (Stocker 1996:23). *Nikola Rašić* (1994:145) enketis en internacia kadro kaj mencias 39% da senreligiuloj.

Oni do povas konkludi, ke en la esperantlingva komunumo la influo de la religioj estas konsiderinda. Ne eblas al mi karakterizi la fortecon

de la unuopaj grupiĝoj. Sed verŝajne la kristanaj IKUE kaj KELI havas la plej multajn membrojn.

2 Ateistoj kaj liberpensuloj en la esperanta lingvo-komunumo

2.1 Antaŭ la Unua Mondmilito – impulsoj el Francio

Pro la relative frua influo de religioj en la esperanta lingvo-komunumo kaj la publikigado de rilataj materialoj, ne mirigas, ke jam du jardekojn post la apero de la Unua Libro estiĝis klopodoj publikigi ankaŭ ateismajn materialojn en Esperanto. Aparte socialdemokrate orientitaj laboristaj esperantistoj en 1906 fondis la internacian organizaĵon „Paco.Libereco“, kiu post la unuiĝo kun la franca laborista Esperanto-organizaĵo en 1910, sin nomis „Liberiga Stelo“. Tiu ĉi organizaĵo publikigis la unikan periodaĵon „Internacia Socia Revuo“ (1907-1913)⁵, en kiu aperis multaj socikritikaj kaj religikritikaj materialoj. Ekz. en 1911 la redaktoroj de la revuo aperigis la broŝuron „Krimoj de Dio“ de *Sebastien Faure* (1858-1942), konata franca anarkiisto, kiu ludis gravan rolon en la Dreyfus-afero. Post la Unua Mondmilito la „Internacia Socia Revuo“ klopodis reaperi, sed en 1920 aperis nur ses numeroj.

Dum la 3-a Universala Kongreso 1907 en Cambridge la aktivulo de „Liberiga Stelo“ *Ferdinand Blanagarian* kaj la pacifisto *Gaston Moch* (1859-1935) iniciatis la fondon de la „Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj“. Tiu organizaĵo de 1907-1914 publikigis la revuon „Libera Penso“, kiun redaktis *René Deshayes* (1870-1940). Inter la honoraj membroj de la Societo i.a. estis la verkisto *Lev Tolstoj* (1828-1910) kaj la hispana reformpedagogo *Francisco Ferrer Guardia* (1859-1909)⁶

⁵ Informojn pri diversaj revuoj mi i.a. ĉerpis el la „Bibliografio de Periodaĵoj en aŭ pri Esperanto“ (Hernández Yzal/Máthé/Molera 2010).

⁶ https://de.wikipedia.org/wiki/Francesc_Ferrer_i_Gu%C3%A0rdia.

2.2 Post la Unua Mondmilito

2.2.1 Impulsoj el Germanio

Post la Unua Mondmilito ekzistis espero pri paca estonteco de la homaro. Sociaj utopioj trovis fekundan grundon. La Ligo de Nacioj akceptis raporton pri Esperanto⁷. Ĝi ne havis la esperitan rezulton, sed tamen pozitive en la socio influis sintenojn pri Esperanto. La lingvo disvastiĝis aparte inter la politike ĉiam pli vigla laboristaro, ne nur en Eŭropo, sed i.a. ankaŭ en Azio (aparte en Ĉinio kaj Japanio). Jam la komencoj de la laborista Esperanto-movado antaŭ la milito estis konsiderindaj. Tamen post la milito tia movado tre fortiĝis⁸. En ĝi ekzistis relative multaj liberpensuloj.

En 1923 fondiĝis „Internacia Ligo de Liberpensuloj“ (ILL), kies antaŭulo (la „Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj“) ĉesis ekzisti en 1914. Pri la celoj de ILL flugfolio⁹ informas jene :

„La Internacia Ligo de Liberpensuloj celas :

kunigi ĉiujn izolitulojn kaj societojn, kiuj forlasis la religiajn dogmojn kaj alprenis liberpensan pensmanieron.

La oficiala lingvo estas la neŭtrala

⁷ League of Nations: Esperanto as an International Auxiliary Language. Report of the General Secretariat of the League of Nations adopted by the third Assembly, 1922 Paris : Impr. des Presses universitaires de France, 57 p.

Esperanto als internationale Hilfssprache. Bericht des Generalsekretariats des Völkerbundes, angenommen von der 3. Vollversammlung des Völkerbundes. Deutsche Übersetzung. Leipzig : Ferdinand Hirt & Sohn, 1923, 48 p.

⁸ Pri la historio de la laborista Esperanto-movado vd. Kolbe (1996), Noltinius (1993) kaj Groschopp (1985:75-78).

Multaj pritemaj dokumentoj kaj arkivaĵoj troviĝas en Fritz-Hüser-Institut Dortmund :

http://www.dortmund.de/de/leben_in_dortmund/bildungswissenshaft/fritz_hueser_institut/start_fhi

Krome vidu la materialojn en la Federacia Arkivo de Germanio (Kolekto Blanke) :

<http://blanke-interlinguistik.de/eo/sapmo-kolekto-blanke.html>

Ankaŭ vidu la studojn M1, M17, S9, S60, S74, S84, S85, R56, R78 ĉe <http://blanke-interlinguistik.de/eo/publikajoi.html> .

⁹ Nedita flugfolio de „Internacia Ligo de Liberpensuloj“ (eble aperis en 1928, Leipzig), en la arkivo de la aŭtoro.

mondhelpingvo Esperanto. Uzante tion, ĝi volas per eldono de internacia liberpensa esperanta gazeto informi kaj raportoj pri la tutmonda liberpensa movado. Plue ĝi volas disvastigi Esperanton inter liberpensaj rondoj kaj aranĝi fakkunvenojn dum la diversaj naciaj kaj internaciaj liberpensulaj kaj esperantaj kongresoj [...] Per nia Internacio ni kunligos nin pli firme. Esperanto estas ankaŭ por ni liberpensuloj la spirita rubando de ĉiuj nacioj.“

De 1923 ĝis 1925 aperis la bulteno „Novaj Tempoj“, redaktita de la germana laborista esperantisto *Kurt Hubricht* (1890 - ?) el Leipzig. De 1925-1927 aperis la revuo „Liberpensulo“, organo de ILL, ankaŭ redaktita de Hubricht. Laŭ informoj, troveblaj en ĉi-tiu revuo, ILL havis membrojn almenaŭ en jenaj landoj :

Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Japanio, Jugoslavio, Litovio, Nederlando, Pollando, Sovetunio, Svedio, Turkio kaj Usono.

Hubricht havis bonajn rilatojn al la Germana Komunista Partio (KPD) kaj atingis, ke la presejo „UNS-Produktionsgenossenschaft“, proksima al KPD, presis la revuon. „Liberpensulo“ enhavis multajn religikritikajn kontribuojn, originalajn kaj tradukitajn, krome informojn pri la internacia movado de liberpensuloj, bibliografiajn indikojn pri diverslingvaj liberpensulaj revuoj, konferencraportojn kaj recenzojn pri ateisma beletro. Jen kelkaj ekzemploj :

1/1925 : Kion vualas la Biblio ?

2/1925 : La bavara konkordato

3/1925 : Pioniroj de libera penso

4/1925 : XIX-a kongreso de Internacia Federacio de Liberpensaj Societoj

5/1925 : La pola konkordato

1/1927 : Virgulina nasko

2/1927 : Religio kaj Ekonomio

La malaktiviĝo de ILL post 1927 kaj la malapero de „Liberpensulo“ verŝajne okazis pro tio, ke bone evoluis la gazetaro de la laborista Esperanto-movado, kie aperis multaj enhance

similaj artikoloj kiel en la menciita revuo. Krom tio fondiĝis proletaraj liberpensulaj organizaĵoj kun socialdemokrataj respektive komunistaj tendencoj.

2.2.2 Liberpensula Sekcio en SAT

La plej gravaj aktivaĵoj liberpensulaj en Esperanto verŝajne realiĝis kadre de „Sennacieca Asocio Tutmonda“ (SAT), kiu ĝis la komenco de la 1930^{aj} jaroj estis la plej grava internacia organizaĵo de la laborista Esperanto-movado. Inter la diverstendencaj grupiĝoj ene de SAT ankaŭ ekzistis Liberpensula Sekcio, kies strukturo kaj internacia disvastiteco tre memorigis pri ILL. Pri la celoj de la Sekcio oni legas :

Celo :

1. Helpi per Esperanto al proleta liberpensa movado.

2. Propagandi Esperanton en liberpensaj organizoj.

3. Batali kontraŭ religio per Esperanto, kontraŭstarante peresperantan propagandon de religioj.¹⁰

La ĉefaj aktivuloj de la Sekcio estis denove *Kurt Hubricht* (redaktoro) el Leipzig, krome *Kurt Klaps* (sekretario) el Danzig (nuntempe Gdansk).

Hubricht kaj aliaj liberpensuloj aktivis ankaŭ kiel kursgvidantoj. Ekz. en 1930 la distrikta organizaĵo de la Proleta Liberpensula Asocio de Leipzig postulis liston de prelegantoj por proponi al 50 liberpensulaj grupoj prelegojn pri Esperanto (Kolbe 1996, II, p. 22).

Dum la SAT-kongresoj kunvenis ankaŭ liberpensuloj. Kadre de la raporto pri la 9-a SAT-kongreso (aŭgusto 1929 en Leipzig), oni legas en la maldekstre orientita „Leipziger Volkszeitung“ :

“En la faka kunveno de la liberpensaj esperantistoj ĉeestis 25 kamaradoj el diversaj landoj. La „Internacio de Liberpensuloj“ estis reprezentata de sia prezidanto *k-do prof.*

*Hartwig*¹¹. De la „Ligo de Socialistaj Liberpensuloj“ ĉeestis *k-do Wiesner* kaj aliaj estraranoj. *K-do Burger*¹², Essen, reprezentis la Proletan Ligon de Liberpensuloj Rheinland-Westfalen. *K-do Rode*, Leipzig, reprezentis la Ligon por Liberpensado kaj Perfajra Sepulto, kaj la *k-doj Desmet* kaj *Destide* la „Ligua materialiste de Belgique“. La traktadojn gvidis *k-do Klaps* el Danzig. *K-do Hubricht*, Leipzig, raportis pri la laboroj kaj sukcesoj de la liberpensula sekcio de SAT. La kunvenantoj atente sekvis la referaĵon de *prof. Hartwig* pri „Esperanto kaj liberpensula movado“ (Laŭ Kolbe 1996, II, p. 48-49).

1929-1932 en „Sennaciulo“ regule aperis rubriko de la liberpensula sekcio, redaktita de *Kurt Hubricht*, tiel por 1930 ekz. en la numeroj 265, 271, 276, 282, 286, 297, 303, 309.

En 1932 SAT skismiĝis pro la fondo de „Internacio de Proletaj Esperantistoj“ (IPE)¹³. Tio ankaŭ malfortigis la liberpensulan sekcion, pri kiu oni trovas nur mallongan mencion en la Jarlibro de SAT 1932 (p. 32). Sekretario de la rubriko en „Sennaciulo“ estis *Adolf Waldmann* el la nordgermana Bremen. *Kurt Hubricht* kaj *Kurt Klaps* ne plu estis menciitaj.

Ankaŭ kadre de kelkaj Universalaj Kongresoj renkontiĝis liberpensuloj, ekz. dum la 17^a UK 1925 en Ĝenevo.¹⁴

Kunlabore kun SAT, kaj ankaŭ sendepende de ĝi, dum la 1920^{aj} jaroj aperis tuta vico da ateismaj publikaĵoj. En 1925 SAT ekzemple eldonis la ateisman krestomation „Kontraŭ Dio“ (Leipzig : SAT-Eldona Fako Kooperativa).¹⁵

¹⁰ Vd. Jarlibro de SAT 1929 / 1930, Paris-Leipzig-Moskvo : Sennacieca Asocio Tutmonda p. 32

¹¹ *Theodor Hartwig* (1872-1954), profesoro, estis grava marksisme orientita filozofo kaj aktivulo en la liberpensula movado

(https://de.wikipedia.org/wiki/Theodor_Hartwig_%28Philosoph%29).

¹² http://eo.wikipedia.org/wiki/Josef_Burger.

¹³ Pri IPE vd. Blanke 1986, Lins 1987.

¹⁴ Kp. „Liberpensulo“ 6/1925, p. 29.

¹⁵ Vidu la tekstojn ĉe :

<http://www.autodidactproject.org/other/kontraudio/enhavo.html>.

2.2.3 Kontribuoj en Sovetunio

En 1930 komuniste orientitaj laboristaj esperantistoj, aparte germanaj kaj sovetuniaj, kiuj antaŭe formis opozicion en SAT, fondis la Eldonkooperativon por Revolucia Esperanto-Literaturo“, EKRELO (vd. Blanke 1996, Hauptenthal 2010). La titolojn de EKRELO presis „Sovetrespublikara Esperantista Unio“, (SEU) en Moskvo. Pro kialoj de pli facilaj distribu-ebloj la oficiala sidejo de EKRELO estis Leipzig. La librojn disvastigis libroservo de Germana Laborista Esperanto-Asocio sub gvido de *Walter Kampfrad* (1901-1980). La eldonejo publikigis titolojn pri sovetuniaj temoj, sed ankaŭ pri interlingvistiko (ekz. de E.K. Drezen) kaj aliaj temoj. Pri ateismo aperis jenaj titoloj :

B. Kandidov : Eklezio kaj Oktobra Revolucio (Leipzig 1931)

O. Levada : Sendiuloj ŝtormas Dnepron. Skizoj pri ateismaj ŝtormbrigadoj (Leipzig 1932)

M. Ŝejnman : Moralo religia kaj moralo proleta (Leipzig 1931)

M. Ŝejnman : Nuntempa socialdemokratio, religio kaj ateismo (Leipzig 1932).

SEU, kiu estis tre aktiva dum la 1920^{aj} jaroj ĝis la periodo de la stalinismaj persekutoj meze de la 1930^{aj} jaroj¹⁶ aldone al EKRELO publikigis serion da broŝuroj sub la titolo „Komunista Biblioteko“, kie i.a. aperis jenaj titoloj :

Ŝejnman : Milito kaj Religio (Moskvo 1929)

V.I. Lenin : Pri Religio (Moskvo 1929)

M. Ŝervud : La vero pri persekutoj kontraŭ religio en USSR (Moskvo 1930)

Tiuj titoloj aperis kunlabore kun Unio de [Sovetuniaj] Militantaj Ateistoj, kiu ankaŭ eldonis aliajn titolojn en Esperanto, inter ili :

L. Lukaĉevski kaj aliaj aŭtoroj : Unio de Militantaj Ateistoj en USSR kaj ĝia laboro (Moskvo-Leningrad 1931)

A.T. Lukaĉevski : Marks kaj Engels pri religio (Moskvo 1933)

Em. Jaroslavskij : Respondoj al ekstersovetiaj

¹⁶ Pri la historio de SEU vidu Blanke/Krasnikov 2008, Vlasov 2011 kaj 2014; pri la persekutoj aparte Lins 1988.

ateistoj (Moskvo 1932).

Ankaŭ eklezi-kritika titolo de *Nikolaj Buĥarin* aperis en Esperanto : Financa kapitalo en la Papa mantelo : pamfleto. Moskvo : 1930, 31 p.

La menciita „Unio de Militantaj Ateistoj“ aperigis en Esperanto resumojn de la ruslingvaj artikoloj aperintaj en la revuoj „Bezboŝnik“ (Sendiulo), „Antireligioznik“ (Kontraŭreligiulo) kaj „Vojnstvujuŝĉij ateizm“ (Militanta ateismo). La resumaj kajeroj (po 20-30 p.) aperis en du serioj : La serio „Militanta Ateismo“ (sole en 1931 kune 206 p.) estis destinita por la klerigo de la laboristoj. La serio „Antireligiulo“ celis doni materialojn por la aktivuloj en la kontraŭreligia batalo, kiel oni legas ĉe *Dmitrij Vlasov* (2014, 251-256).

2.3 Post la Dua Mondmilito : ATEO

Post la Dua Mondmilito la esperantlingva liberpensula movado reaktiviĝis, aparte dum la 1950^{aj} jaroj, denove en SAT. La Liberpensula Frakcio de SAT eldonis de 1954-1957 la broŝurserion La Liberpensulo (redaktis *André Gay*, Herblay). La sekcio tamen ne estis tre aktiva. En „Sennaciulo“ nur fojfoje aperis pritemaj rubrikoj. Pli da aktivajoj videblis en la franclingva SAT-organizaĵo „SAT-Amikaro“. Tie *André Caubel* (1904-1977) estis aparte aktiva. Li i.a. agadis en la franca liberpensula movado, kiu aperigis la monatan gazeton „*La Raison*“. Tie li estis sekretario por eksteraj rilatoj¹⁷. Liaj klopodoj aligi la liberpensulan frakcion al la Tutmonda Unio de Liberpensuloj ne sukcesis. Dum multaj jaroj la liberpensula SAT-frakcio estis malaktiva. Pro tio dum la 72-UK 1987 en Varsovio oni fondis la „Ateistan Tutmondan Esperanto-Organizon“ (ATEO).

La fondoprezidanto *Ralph Dumain* (1987-2002)¹⁸, kiu ankaŭ redaktis la revuon „Ateismo“ de 1988-1991, informis, ke la celoj de ATEO estas¹⁹ :

¹⁷ <http://www.esperanto-sat.info/article971.html>.

¹⁸ Post *Ralph Dumain* la prezidantoj de ATEO estis *Claude Nourmont* (2002-2009), *Christian Rivière* (2010-2013) kaj ekde 2014 prezidas *Roland Schnell*.

¹⁹ <http://www.autodidactproject.org/bib/ATEO1.html>.

- Kunligi Esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn.
- Disvastigi Esperanton inter ateistoj.
- Defendi propran egalrajtecon kaj kontraŭi trudadon de religio en neŭtralajn Esperanto-grupojn.
- Instigi ĉe neŭtralaj Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe nereligiaj grupoj, se oni varbas ĉe religiaj grupoj.
- Akceli racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem kaj strebi altigi la intelektan kaj kulturajn nivelojn de Esperantujo.
- Libere diskuti kaj analizi ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn kaj ĉiajn rilatajn sociajn problemojn.
- Malkateni la mensojn !

La membro de ATEO, *Roland Schnell* en la germana revuo „Diesseits“ (Schnell 1989) raportas jene pri la bazaj ideoj de ATEO :

„En ATEO regas unueco pri tio, ke oni ne intencas krei novan ideologion, sed alstrebas kunlaboron kaj pensinterŝanĝon kun aliaj naciaj kaj internaciaj organizaĵoj de liberpensuloj kaj ateistoj. Krom tio oni donis al si la taskon, aktivadi en la Esperanto-movado kontraŭ malraciismo kaj la pretendo de religiaj grupoj posedi la monopolon pri problemoj de etiko kaj moralo“.

La eldonoj de „Ateismo“ ĝis 2012 troviĝas en la reto²⁰. Espereble sekvas ankaŭ la aliaj eldonoj. La titoloj de kelkaj kontribuoj el la unuaj jaroj iom karakterizu la enhavon de la revueto :

1 (Aŭtuno 1988) : Feliĉa sen Dio.

2 (Januaro 1989) : Dio kaj Ŝtato (Miĥail Bakunin)

3 (Majo 1989) : Nova Societo de Liberpensularo Fondita en GDR.

4 (Januaro 1990) : Eklezia Imposto.

5 (Majo 1990) : La Papo vizitas Ĉeĥoslovakion.

6 (Septembro 1990) : Polaj esperantistaj ateistoj kunvenas.

7-9 (Januaro-Septembro 1991) : El : „Kontraŭreligia propagando“ de Lew Trockiĵ

En la lastaj kvin kajeroj oni i.a. trovas jenajn kontribuojn :

16 (Majo 2013) : Ateistoj tra la mondo suferas persekuton kaj diskriminacion.

17 (Novembro 2013) : 25 jaroj da laika konfirmacio en Islando.

18 (Junio 2014) : La „Dek ordonoj“.

19 (Novembro 2014) : Duboj pri la porkido (diskuto, ĉu estas rasisma la libreto „Kie ni povas trovi Dion ? demandis eta porkido“).

20 (Majo 2015) : Ĉu religio estas ofendebla ?

3 Rilatoj de internaciaj liberpensulaj organizaĵoj al Esperanto

Estas rimarkinde, ke neesperantistaj internaciaj liberpensulaj movadoj kaj kongresoj prenis starpunktojn pri Esperanto jam komence de la 20-a jarcento. Ekzemple la kongresoj de la „Fédération Internationale de Libre Pensée“ 1904 (Rom)²¹, 1905 (Paris)²² kaj 1906 (Buenos Aires)²³ sin esprimis pozitive pri Esperanto kiel internacia komunikilo, uzebla por la liberpensula movado.²⁴

Inter la du mondmilitoj certa kunlaboro ekzistis inter la esperantistaj liberpensuloj kaj la „Internacio de Proletaj Liberpensuloj“ (IPF)²⁵. Jam dum la fonda kongreso de IPF en 1924 oni rezoluciis por Esperanto (Hubricht 1929:177). Kiel supre menciite la prezidanto de IPF *prof. Theodor Hartwig*, grava sciencisto, subtenis la (esperantistan) „Internacian Ligon de Liberpensuloj“ (ILL) kaj i.a. partoprenis la 9-an SAT-Kongreson en Leipzig²⁶. Dum ĉi-tiu kongreso *Hubricht* estis elektita la kunliganto inter la

²¹ Fédération Internationale de Libre Pensée, Congrès de Rome, XX septembre 1904, Compte Rendu Officiel, Edition Gand 1905.

²² Fédération Internationale de Libre Pensée, Congrès de Paris, 3 au 7 septembre au palais du Trocadéro, Compte Rendu. Paris 1906.

²³ Vd. Hubricht 1929, p. 177.

²⁴ Laŭ retmesaĝo de *Dominique Simeone* (8.8.2006).

²⁵ Germane : „Internationale Proletarischer Freidenker“ (IPF)

²⁶ Ankaŭ vd. la artikolon de Hubricht : „Prof. Th. Hartwig – Prezidanto de la “Internacio de Proletaj Liberpensuloj“, en : Liberpensulo 2(1926) nro.3 : p. 15-16.

²⁰ Vd. <http://www.gazetoteko.com/ateo/index.html> .

liberpensula sekcio de SAT kaj IPF.²⁷

Pozitive por Esperanto rezoluciis ankaŭ kelkaj pluaj naciaj asocioj, ekz. la liberpensulaj asocioj de Aŭstrio kaj Pollando (Hubricht 1929:178). Kelkaj asocioj okazigis ankaŭ Esperanto-kursojn. La atentigon „Oni korespondas esperante“ oni trovis i.a. en la revuoj „Le Matérialiste“ (Bruselo), „Bezbožnik“ (Moskvo), „Der proletarische Freidenker“ (Essen), „Der Gottlose“ (Gotha), „De Vrijdenker“ (Amsterdam), „Bezvirnik“ (Charkov), „Der Freidenker“ (Wien), „Zycie Wolne“ (Varsovio). Fojfoje oni trovis en la menciitaj revuoj esperantlingvaj enhavtabelojn.

Troveblas nur malmultaj informoj pri kunlaboro inter liberpensulaj asocioj kaj esperantistoj post la Dua Mondmilito. Certaj rilatoj ekzistis al la okcidentgermana liberpensula asocio. En ties organo „Der Freidenker“ (La liberpensulo) dum la 1980^{aj} jaroj fojfoje aperis Esperanto-rubrikoj, ekz. en n-ro 4/1982.

Dum la lastaj jaroj Esperanto trovis certan novan intereson en la liberpensula movado de Francio. La francaj naciaj kongresoj de „Fédération Nationale de la Libre Pensée“ (F.N.L.P.) 2001 (Gisors) kaj 2005 (Metz) rezoluciis por Esperanto²⁸.

La internacia kongreso de liberpensuloj dum julio 2005 en Parizo en rezolucio alvokis konsideri Esperanton substrekante, ke la lingvaj bariloj „malhelpas la rektan interŝanĝon de ideoj, spertoj kaj informoj en la kampo kontraŭ obskurantismo, misuzo de kredo kaj superstiĉo“.²⁹

De certa signifo ankaŭ estas la rilatoj de ATEO al „International Humanist and Ethical Union“ (IHEU), fondita en 1952. Por IHEU *Dominique Simeone* disponigis kelkajn tekstojn en Esperanto en la retejo de la organizaĵo.³⁰

²⁷ Vd. „Der Gottlose“, Berlin Nr. 8-9/1929, p. 2. La monata revuo „Der Gottlose“ (La sendiulo), estis proksima al Verband für Freidenkertum und Feuerbestattung“ (Asocio por liberpensa aferaro kaj fajra sepulto) kaj „Vereinigung oppositioneller Freidenker e.V.“ (Unuiĝo de opoziciaj liberpensuloj) kun sidejo en Gotha).

²⁸ Vd. E-Mail von Dominique Simeone (8.8.2006).

²⁹ Vd. Simeone, Dominique (2006a).

³⁰ Vd. www.iheu.org/node/340 . (17.8.2006; en julio 2015 ne

En novaĵletero de IHEU ties funkciulo *Babu Gogineni* i.a. skribis :

“Esperantists who have been inspired by Zamenhof’s vision of one language which can unite all the peoples of the world who are working towards the establishment of peaceful world order and universal culture. I believe that if Humanism needs a language other than reason and reasonableness, then it would be Esperanto ; and that if Esperanto needed a philosophy other than that of Dr. Zamenhof’s vision, then it would be Humanism. May we work together to create an equitable world order and achieve our common goals in this fast globalising world“ (Gogineni 2006:24)³¹.

La (franca) Nacia Federacio de Libera Penso aliĝis al IHEU, sed en 2005 kreis novan asocion.

Ankaŭ en la retejo de *International Association of Free Thought (IAFT)* oni trovas kelkajn informojn en kaj pri Esperanto³² :

- Tie estas ligo al kaj informoj pri la esperanta sekcio de IAFT, la Internacia Asocio de Liberpensuloj

(<http://www.internationalfreethought.org/spip.php?rubrique11>), kiu fondiĝis la 27-an de novembro 2011³³, krome ligoj al ATEO kaj SAT.

Krome menciindas la rolo de la Esperanto-Komisiono, gvidata de *Dominique Simeone*, de „Fédération Nationale de la Libre Pensée“ (Parizo). En la koncerna retejo ankaŭ troviĝas kelkaj artikoloj lige al Esperanto kaj ateismo.³⁴

plu trovebla.

Tamen vidu <https://eo.wikipedia.org/wiki/Liberpensuloj> .

³¹ „Esperantistoj, kiuj estas inspiritaj de la vizio de Zamenhof pri unu lingvo, kiu povas unuigi ĉiujn popolojn de la mondo, laboradas por estigo de paca monda ordo kaj universala kulturo. Mi kredas, se Humanismo bezonas lingvon alian ol prudentecon kaj raciecon, tiam tio estus Esperanto ; kaj se Esperanto bezonus filozofion alian ol la vizion de Dr. Zamenhof, tiam ĝi estus Humanismo. Lasu nin kune labori por krei justan mondan ordon kaj por atingi niajn komunajn celojn en tiu ĉi rapide globaliĝanta mondo“.

³² <http://www.internationalfreethought.org/spip.php?page=recherche&recherche=esperanto>

³³ <http://www.internationalfreethought.org/spip.php?article10>

³⁴ <http://www.fnlp.fr/spip.php?article85>

Ke ATEO klopodas nodi kontaktojn al neesperantistaj organizaĵoj kaj aktivuloj videblis dum ĝia kunsido kadre de la 98-a UK 2013 en Rejkjaviko, kie pri laikaj konfirmacioj en Islando prelegis *Hope Knútsson*, la prezidantino de Sidmennt, la Islanda Etika Humanisma Asocio (kp. Ateismo n-ro 17, p. 3-8).

Finaj rimarkoj

Mi klopodos iom revui la ateisman / liberpensulan literaturon kaj movadon lige al Esperanto, ne distingante inter ‚liberpensado‘ (liberpensuloj) kaj ‚ateismo‘ (ateistoj). En la literaturo tiuj du nocioj uziĝas pli-malpli sinonime, kvankam ‚ateismo‘ al mi ŝajnas pli aktiva, pli batalema nocio. Sed eble tio dependas de la konkretaj personoj kun siaj edukoj, spertoj, opinioj kaj vidpunktoj, krome la politikaj cirkonstancoj influas.

Krome laŭ mi estus utile distingi inter liberala kredo, dogma fundamentismo kaj diversaj eklezioj kaj sektoj. Ekzistas homoj, kiuj iel sekvas siajn religiajn kredojn kaj spirite vivas kontente, sed samtempe ili eble akre kritikis, eĉ abomenas la eklezion, kiu en la pasinteco kaj la nuntempo tro ofte misuzis sian potencon, kio rezultigis ĉe kredantoj fizikajn kaj psikajn vundojn. Sed tio estas aparta temo, pri kiu ekzistas speciala literaturo, ekz. de *Karlheinz Deschner* [1924-2014], kiu verkis dekvoluman historian analizon pri la krimoj de la eklezio (vd. Blanke 2015).

Literaturo

Blanke, Detlev (1986) : La Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE) En : Blanke, Detlev (Red.) : *Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado*. Budapeŝto : Hungara Esperanto-Asocio (2-a eldono), p. 50-62.

— (1996) : EKRELO. En : *Kolbe 1996*, parto II, p. 69-83.

— (2014) : Die Bibel in Plansprachen. En : Ina Müller (Red., 2014) : *Translationswissenschaft als Interdisziplin : Beiträge des*

Ehrenkolloquiums zum 70. Geburtstag von Heidemarie Salevsky, Berlin : epubli GmbH, p. 95-122.

— (2015) : Krimoj de la eklezio. En : *Ateismo*. Bulteno de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo, No 20 (Majo 2015), p. 10-12.

— Krasnikov, Oleg, (2008) *Esperanto-dviĝenie : fragmenty istorii*. (Esperanto-movado : fragmentoj el la historio). Moskva : Impeto, 2008, 214 p., (kun ilustraĵoj).

Gilkey, William (1980) : La Historio de Oomoto. En : *Oomoto*. Julio-decembro, p. 79-87.

Gogineni, Babu (2006) : IHEU's Statement to the 2006 April Esperanto Congress. En : *International Humanist News*, Juni 2006, p. 24.

Groschopp, Horst (1985) : *Zwischen Bierabend und Bildungsverein*. Berlin : Dietz, 244 p.

Halve, Jens (1999) : Die Bahá'í im Visier der Ajatollas. En : *Program*, Nr. 202, Februar-März 1999, p. 31-32.

Hernández Yzal / Máthé, Árpád / Molera, Ana Maria (2010) : *Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto*. Budapeŝto : Bibliografia Fondaĵo Luis M. Hernández Yzal. (14143 bibliografiaĵoj unuoj), 1155 p.

Hauptenthal, Reinhard (2010) : *EKRELO. Eldonkooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo. Ein Verlag, seine Bücher und ihr Standort. Eldonejo, ties libroj kaj ilia trov-loko*. Bad Bellingen: Edition Iltis, 39 p.

Hubricht, Kurt (1929) : Esperanto inter la liberpensularo tutmonda. En : *La Nova Epoko* XI/X, Nr. 7(67), p. 177-178.

Kiselman, Christer (2010) : Hilelismo, homaranismo kaj neŭtrale-homa religio. En : Detlev Blanke / Ulrich Lins (2010, Red.), *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*. Rotterdam : Universala Esperanto-Asocio, p. 401-414.

Kolbe, Ino (1996) : *Zur Geschichte des Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes in Leipzig*

(*Westsachsen*). *Teil I und II. Von den Anfängen bis zum Verbot 1933. Teil I: Von den Anfängen bis zum „Völkerspiegel“ (1924) ; Teil II: 1925 bis zum Verbot (1933)*. Eine kommentierte Dokumentation. Herausgegeben, kommentiert und bearbeitet von Detlev Blanke. Leipzig: Sächsischer Esperanto-Bund, 64+vvviii+136+23p.

Lins, Ulrich (1976): *Die Ōmoto-Bewegung und der radikale Nationalismus in Japan*. München-Wien: Oldebourg, 300 p. (doktoriga disertacio).

— (1987): *La baraktado de IPE. Ĉapitro el la historio de la laborista Esperanto-movado. En: Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo. Vol. II. Esperantismo*. La Laguna: Universidad de la Laguna, p. 353-369.

— (1988): *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*. Gerlingen: Bleicher, 546 p. (represo 1990, Moskva: Progreso, kun postvortoj de Sergej Kuznecov kaj Detlev Blanke).

Matthias, Ulrich (2001): *Esperanto. La nova Latino de la eklezio*. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 142 p.

Noltenius, Rainer (Red. 1993): *Den Arbeitern aller Länder eine Sprache! Illustrierte Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung. Al la laboristoj en ĉiuj landoj unu lingvon! Ilustrita historio de la Laborista Esperanto-Movado*. Informationen 37/93. Katalog zur Ausstellung des Fritz-Hüser-Instituts Dortmund. Dortmund: Fritz-Hüser-Institut für deutsche und ausländische Arbeiter-Literatur (Tekstoj en la germana kaj Esperanto), 113 p.

Rašić, Nikola (1994): *La rondo familia. Sociologiaj esploroj en Esperantio*. Pisa: Edistudio, 192 p.

Schnell, Roland (1989): *Internationale atheistische Organisation im Esperanto-Bereich gegründet*. En: *Diesseits*, 7(Juni)/1989, p 32-33.

Simeone, Dominique (2006a): *Pour l'espéranto*. En: *La Raison. Le Mensuel de la*

Libre Pensée. Nr. 508 (février), p. 23.

— (2006b): *Esperanto, a way to Humanism*. En: *International Humanist News*, Juni 2006, p. 24.

— (2006c): *Radiodisaŭdigo: „Divers aspects de la pensée contemporaine“*. En: *France-Culture (Radio France)*, 12.03.2006.

Stocker, Frank (1996): *Wer spricht Esperanto? Kiu parolas Esperanton?* (Studien zur Sprachplanung / Lingvoplanaj studoj 01, hrsg. v. Martin Haase): München-Newcastle: Lincom Europa, 150 p.

Vlasov, Dmitrij V. (2011): *Ĕsperanto: polveka cenzuro*. Moskva: Impeto, 182 p. (Esperanto duonjarcento sub cenzuro)

— (2014): *Istorija primenenija Ĕsperanto v. Rossii: peĉat', radioveščanije, perezpiska, samizdat*. Moskva: Impeto, 404 p. (Historio de la apliko de Esperanto en Rusio, gazetaro, radiodisaŭdigoj, korespondo, „Samizdat“).

Zamenhof, L[udwig] L[azar] (1929): *Originala Verkaro*. Hrsg. von Johannes Dietterle. Leipzig: Ferdinand Hirt, 604 p.

Detlev Blanke (Germanujo)

Religio kaj socio

Studo de Instituto « Sociovision » (la 10^{an} de novembro 2014):

En Francio estas nur 10 % de praktikantoj de ĉiuj religioj inkluzive, (14 % antaŭ 20 jaroj)

80 % konsideras ke la religio devas resti en la privata kampo.

50 % de la islamanoj preferas la principon de la religia neŭtraleco.

60 % konsideras akceptebla la elmontron de la religio sur la lokoj de laboro (vualo, preĝoj, nutraj malpermesoj...)

malpli ol 50 % de la francoj sin konsideras kredantoj.

7 % da kredantoj malpli hodiaŭ ol antaŭ 20 jaroj. 2 % da kredantoj malpli hodiaŭ ol antaŭ unu jaro, en 2013.

70 % kontraŭ aranĝo de la labortempo pro religiaj motivoj.

La dispartigo de la islamanoj inter la politikaj partioj estas identa al tiu de la francoj ĝenerale.

Dum la plimulto el la francoj deziras ke laikeco pligraviĝu, la politikistoj, dekstraj kiel maldekstraj timas plifortigi laikecon.

Komunikis Jean Marin (Francoj)

En katolika periodaĵo mi trovis strangan ekzemplon de religia propagando (vidu sube), interalie kontraŭ-ateisma. Fono estas la demografa situacio en Germanujo. Laŭ tiu ĉi skizo, „kredantaj“ virinoj naskas la idealan nombron da infanoj, dum islamanoj „troigas“ minace. Sed „ne-kredantaj“ virinoj ankaŭ kontribuas al socia malstabiligo.

Winfried Schumacher (Germanujo)

La figarbo

Tiu ĉi artikolo eble estas interesa nur por ekskristanoj kiel mi. Temas pri alineo el evangelio, kiu, laŭ mia memoro, neniam estis voĉlegata en iu diservo – kaj en mia junaĝo mi partoprenis en multegaj diservoj. La kialo ŝajnas klara : Jesuo tie ĉi ŝajnas neracie reagi pro kolero.

Mat. 21,18 – 22 :

¹⁸Kaj matene, dum li revenis al la urbo, li malsatis. ¹⁹Kaj vidante figarbon apud la vojo, li iris al ĝi, kaj trovis sur ĝi nenion krom folioj ; kaj li diris al ĝi : « Ne plu estu frukto sur vi poreterne. » Kaj tuj la figarbo forvelkis. ²⁰Kaj kiam la disĉiploj vidis, ili miris, dirante : « Kiel rapide la figarbo forvelkis ! » ²¹Kaj Jesuo responde diris al ili : « Vere mi diras al vi : Se vi havos fidon kaj ne dubos, vi ne nur faros la aferon de la figarbo, sed eĉ se vi diros



al ĉi tiu monto : Estu formovita kaj ĵetita en la maron ; tio plenumiĝos. ²²Kaj ĉion, kion vi petos per preĝado, kredante, vi ricevos. »

(laŭ la Zamenhofa traduko)

Kutime la „mirakloj“ en la evangelioj estas nomataj „signoj“ – do ili havas *signifon*. Laŭ la kunteksto la signifo de tiu ĉi „signo“ estas klara : Temas pri la fido de la disĉiploj ; Jesuo admonas ilin, ke per pli granda fido ankaŭ ili kapablu fari tiajn miraklojn. – Sed duavide tiun funkcion povas ja plenumi iu ajn miraklo – kaj ju pli grandioza la miraklo, des pli impona estus la efiko de „fido“. Fakte la „moralo“ pri la nesufiĉa fido ofte estas vortumita en la evangelioj, ankaŭ en kunteksto kun aliaj mirakloj. Sed ĝuste tiu ĉi miraklo, velkigado de figarbo, ja ŝajnas iom stranga. Unue la efiko ne estas tiom grandioza, kaj due la „signo“ mem karakterizas Jesuon kiel neracian koleremulon, kontraste al multaj aliaj epizodoj, en kiuj li aktoras.

La filologoj konsentas, ke esence la evangelioj ne estas biografioj de Jesuo. La ĉefa afero estis *la mesaĝo* („evangelio“ signifas „bona mesaĝo“), kaj la evangelioj ĉefe havas la funkcion atribui la fru-kristanan doktrinon al la persono de Jesuo. La bazaj elementoj de tiu doktrino jam ekzistis antaŭ ol la evangelioj estis verkitaj. Krome certas, ke la verkintoj de la evangelioj jam ĉerpis el skribitaj fontoj : Tre verŝajne jam ekzistis kolektoj de „eldiroj“ de Jesuo, kiuj tamen ankoraŭ ne estis ligitaj inter si per biografieca rakonto. Legante la epizodon pri la figarbo oni demandas sin, kial entute ĝi estas transprenita en evangelion : Ĝia instrua „valoro“ ne ŝajnas esti tre granda, kaj ĝi skizas la karakteron de Jesuo ne tre simpatia.

Mi trovis, ke du nekristanaj aŭtoroj atentis pri la „figarbimiraklo“ kaj venis al similaj

konkludoj.

Unue : Bertrand Russell en sia teksto „Why I am not a Christian“ („Kial mi ne estas Kristano“; origine prelego de 1927). Russell interalie prijuĝas la karakteron de la (historia) Jesuo. Li konscias, ke la evangelioj ne estas tre taŭgaj kiel bazo de tia prijuĝo, sed tamen li uzas la ilin kiel fontojn, ne nur ĉar aliaj fontoj praktike ne ekzistas, sed ankaŭ ĉar la evangelioj ja havas specialan aŭtoritaton ĉe Kristanoj. La „figarban miraklon“ li komentas jene (mi tradukis el la Germana traduko) : „Tio estas tre stranga rakonto, ĉar oni ja ne povis riproĉi al la figarbo, ke ne estas la taŭga sezono por figoj ! Mi persone ne opinias, ke Kristo rilate saĝecon aŭ virton estas same elstara kiel aliaj historiaj personoj. Ĉirilate mi pli alte taksus Budhon aŭ Sokraton.“

La dua atestanto estas la Israela aŭtoro Amos Oz en sia romano „(La evangelio de) Judas“. La ĉefa figuro de tiu romano, Ŝmuel Aŝ, estas verkisto ne tre sukcesa. Lia centra temo, pri kiu li estas verkanta disertacion, estas „Jesuo el juda perspektivo“. Pri Jesuo do li okupiĝas, ĉefe surbaze de la evangelioj. Interalie li demandas sin, ĉu Jesuo vere estis „dia homo“. Ĉefe pro la rakonto pri la figarbo li venas al la konkludo, ke tia persono nete ne povas esti nomata „dia“.

Por mi restas la demando, kial la „evangeliisto“ Mateo entute enmetis tian epizodon en sian evangelion. La „apokrifaj evangelioj“ montras, ke ekzistis multe pli da eldiroj, rakonteroj kaj epizodoj de kaj pri Jesuo, ol estas rakontataj en la kvar „oficialaj“ evangelioj. Tutcerte la „evangeliisto“ nek povis nek volis enkadrigi ĉiujn ie ekzistantajn tekstetojn pri Jesuo en sian verkaĵon. Kial do tamen aperas tiu stranga miraklo ? – Mi risku konjekton : Eble iu velkanta kaj preskaŭ mortinta figarbo estis videbla ie en Jerusalemo

ankoraŭ dum jaroj post la ekzekuto de Jesuo, kaj eble la kristana prakomunumo de Jerusalemo obstine interpretis ĝin kiel postrestaĵon de miraklo de Jesuo kaj do kiel ateston ne neglektindan de liaj supernaturaj povoj. Kaj por certigi, ke la koncerna miraklo fakte okazis, ĝi devis aperi en evangelio, kompreneble !

*Dr. Winfried Schumacher,
Christinastr. 80, D-50733 Köln*

La eterna reveno

Friedrich Nietzsche, Niĉeo, germane filozofo (1844 - 1900)

La niĉea filozofio disvolvas tiun ideon de eterna reveno. Kion oni tie komprenu ? Ni aŭskultu Zaratuŝtra-n : « Mi revenos kun tiu suno, kun tiu tero, kun tiu aglo, kun tiu serpento, ne en novan vivon, nek en pli bonan vivon, nek en similan vivon : mi eterne revenos por tiu sama kaj identa vivo, kun ĉiuj ĝiaj grandecoj kaj ĉiuj ĝiaj mizeroj, por denove instrui la eternan revenon de ĉiuj aĵoj. » Oni ne miskomprenu : ne temas pri releviĝo en superan vivon, nek pri reenkarigi en alian teran vivon, nek en ciklan eternan ripetadon de la samo. Temas por la estulo, kiu akceptas la vivon en sia impeta fluego, esti preta revivi sen escepto, ĉiujn spertitajn travivaĵojn kaj momentojn. Do tute temas ne pri senmorteco, sed pri la lasta esprimo de la amo de la vivo tia, kia ĝi estas. Tio postulas apartan forton de karaktero por kontraŭflue de la komuna opinio aserti, ke la vivo konsistas en la povo esti, pensi kaj agi.

(Libera traduko de la paragrafo 248, el “365 expressions philosophiques expliquées“

365 klarigitaj filozofiaj esprimoj, Michel Brivot & Nicole Masson, eldonejo *Chêne*.)

Tradukis Bernard Behra

Du reagoj al la kontribuo de Thomas Heberlin (en la lasta numero de Ateismo)

La letero de Thomas Heberlin, kiu demandis (verŝajne sincere) "ĉu fariĝi ateisto signifas ne plu okupiĝi pri aliaj filozofioj, ĉesigi pensadon" surprizis min kaj montras, ke verŝajne ni devas pli klare informi la publikon pri tio, kio estas ateismo. Estas evidente al ni mem, ke ni kompreneble ĝuas pensi kaj scivolas pri la universo, kulturo, historio, filozofio, ktp... Sed ja inter aliaj homoj estas ofta (falsa) kliŝo kontraŭ-ateisma, ke ateismo estas senpensa blinda dogmo, same kiel religio, aŭ eĉ ke ateismo mem estas simple alia speco de religio, kredata senpense.

Sed kompreneble MANKO de kredo je dio baze de la manko de kialoj por kredi je dio (unu speco de ateismo) ne samas al aktiva kredo je dio. Kaj eĉ aktiva kredo ke dio NE ekzistas (pli forta speco de ateismo) baziĝas sur rezonado kaj rigardo al indikaĵoj pri ties ekzisto aŭ neekzisto (do same kiel ni kredas ke la tero rotacias, ni kredas ke objektoj falas en gravito, ktp : estas klaraj argumentoj kaj indikaĵoj, kiuj subtenas tian kredon), anstataŭ sur nura kredo je malnova religia teksto (aŭ sur socia premo aŭ nura tradicio), sen logika aŭ scienca indikaĵo pri la afero.

Tamen mi iom kunsentas la malŝaton de Thomas, ke la bulteno fojfoje havas tre kliŝajn troigajn karikaturojn kun religiuloj kiel absurde stereotipaj stultaj frenezaj teroristoj ktp (tia bildŝerco iom ironie aperas sur la

paĝo 9 apud lia letero). Tiaj bildserĉoj ekzistas kontraŭ ĉia ajn homgrupo, svarme en interreto ekzemple, kaj fojfoje amuzetas homojn, kiuj ne ŝatas la mokatan celgrupon, sed ili ne multe servas al utila diskuto. Ili eble pli fermas ol malfermas mensojn, kaj pli firmigas jamajn konvinkojn ol pensigas.

Ili ankaŭ povus forpuŝi amikajn religiulojn, kiuj eventuale legus la bultenon kaj ja konsentas, ke ĉiu havu rajton vivi sen religio kaj ties deviga influo (t.e., ke religio estu persona afero), sed kiuj tamen sentus sin forpuŝita de ATEO pro tro ofta insulta malestimo al religiuloj ĝenerale kiel homgrupo.

(Konsideru la renverson : mi, kaj kredeble multaj aliaj ateistoj, multe pli emus alianciĝi kaj amikiĝi kun tiuj religiuloj, kiuj traktas ateistojn afable malgraŭ malsamaj mondrigardoj, ol kun tiuj juĝemaj religiuloj, kiuj konstante atake diras ke ateistoj estas maletikaj malhonestaj stultaj arogantaj fiuloj irantaj al infero ktp.)

Sed eble tio dependas de la konkretaj celoj de ATEO kaj de ĝia bulteno. Ĉu nur interna cirkulero por ateistoj, aŭ ankaŭ simpatie interesa kaj informa por ne-ateistoj? Ĉu batalo kontraŭ religio, ĉu batalo por egaleco kaj justeco por ĉiuj sendepende de religio?

Russ Williams, Polujo



Legante la kontribuon de Thomas Heberlein el Germanujo en la lasta numero de Ateo, mi estis surprizita :

1) de la demando : « Ĉu fariĝi ateisto signifas ne plu okupiĝi pri aliaj filozofioj ? Alivorte : ĉesigi pensadon ? »

Laŭ mi, estas la malo. Esti ateisto aŭ agnostikulo ĉion permesas, ĉu okupiĝi pri filozofioj aŭ ne ... Eĉ pli, ateismo liberigas nin de la kutima pretigita pensmaniero kiun la societo pere de nia edukado, trudas al ni. Fine ateismo lasas nin pensi kaj decidi per ni mem. Ni ne plu havas « modelon » por sekvi. Ni serĉas la plej taŭgan manieron trapasi la tutan vivon. Simple, fari al la aliaj kion ni ŝatus ke ili faru al ni. Tio postulas pripensadon eĉ se la afero ne aspektas tiel. Ateismo estas deirpunkto al libereco kaj humana komprenemo. Ne plu kredante je iu dio, ateisto fidus Homon, do « kredas » je Homo se mi povas uzi tiun esprimon.

2) de la rimarko pri karikaturaj kiujn la aŭtoro malŝatas. Kial ne mok(et)i la kredojn de homoj ? Kial ofendiĝi pri tio ? Kredo estas nur virtuala koncepto neniam pruvita. Moko de homoj ne povas esti akceptata sed kredoj ŝajnas al mi tute alia afero. Mi volonte konsilus al kredantoj ke ili ne hezitu moki niajn ne-kredojn. Mi volus vidi tion kaj mi vetas ke ateistoj ridus, fajfus pri tio anstataŭ procesi, koleri aŭ malpermesi ! Tamen, pripensu pri tiuj multaj kredantoj kiam ili asertas ke mankas « io » al la ne-kredantoj, subdirante ke tiu « manko de spiritualeco » malhelpas ilin egali la kredantojn. Kiel pritaksi tiun antaŭjuĝon ?

Martine Rivière, Francujo

Ateismo

organo de ATEO

Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo

<i>Vorto de la redaktoro</i>	<i>2</i>
<i>Ateismo kaj la rajto je libera esprimiĝo (kongresa temo)</i>	<i>2</i>
<i>Esperanto kaj ateismo</i>	<i>6</i>
<i>Religio kaj socio.....</i>	<i>15</i>
<i>La figarbo</i>	<i>16</i>
<i>La eterna reveno</i>	<i>18</i>
<i>Du reagoj al la lastnumera kontribuo de Thomas Heberlin</i>	<i>18</i>

Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro : ateismo@orange.fr

Por informoj : **Anna Löwenstein**, anna.lowenstein@esperanto.org

117 Dukes Avenue, London N10 2QD, Britujo

Prezidanto : **Roland Schnell**, Germanujo

Vicprezidanto : **Dominique Simeone**, Francujo

Sekretario : **Anna Löwenstein**, Italujo

Kasisto : **Dieter Rooke**, Svislando

Redaktoro : **Christian Rivière**, Francujo

Jarkotizo : 10 € por A-landoj
8 € por B-landoj

Konto **ateo-y** ĉe UEA